

## **Protokolo pri la laboro de la Komitato de ILEI,** **47a Konferenco, Montevideo 2014**

Unua kunsido, dimanĉe 2014-07-20, 11.00h-12.30h

### **Tagordero 1. Bonvenigo. Kontrolo de la ĉeestantoj kaj anstataŭantoj. Voĉnombrado. Kontrolo de kvorumo.**

Ĉeestas reprezentantoj kun 29 voĉoj entute.

### **Tagordero 2. Konfirmo de retaj voĉdonoj dum la jaro. VOCHD K 01 : Kiel atingi kvorumon en Montevideo ?**

Reta voĉdono por ebligi reprezentadon konfirmita per 28 poraj, 0 kontraŭ, 1 sindeteno  
Kvorumo estas.

Venas gratulo al la prezidanto Mireille Grosjean (MG), ke ŝi tre frue lanĉis voĉdonon por solvi la problemon de la kvorumo en tiu ĉi Konferenco.

**Tagordero 3. Definitivigo de la tagordo.** Venas propono, ke la elekto de la elekta komisiono ne okazu hodiaŭ. Akceptita.

### **Tagordero 4. Elekto de protokolantoj**

Duncan Charters pretas noti rezultojn kaj liveri notojn. Akceptita.

### **Tagordero 5. Elekto de voĉnombrantoj**

Michel Dechy kaj Jennifer Bishop pretas nombri, kiam ni voĉdonos. Akceptita.

### **Tagordero 6. Starigo de dumkonferencaj komisionoj**

Rob Moerbeek proponas, ke estu rezolucio : ke venu propono, ke niaj ligoj kun UNESKO firmiĝu.

Unuanime akceptita, ke ni havu dumkonferencan komisionon por verki rezolucion pri tio.  
Komisiono proponita kaj akceptita:

Rob Moerbeek, François Lo Jacomo, Ron Glossop, Mireille Grosjean

### **Tagordero 7. Informo pri la laboro de la estraro dum la jaro**

En 2013 ni (estraro) voĉdonis 14-foje. En 2014 8-foje Do ni abunde voĉdonis. MG havas superrigardon sur la partopreno de ĉiu estrarano en la retaj voĉdonoj.

Nia estraro nombras 9 personojn. Ne ĉiuj laboras regule kaj efike. Tio devas pliboniĝi. Ĉiu havas difinitan taskon, tamen kelkaj ne agadas.

### **Tagordero 8. Aprobo de Financkontrola Komisiono**

Simon Smits el Nederlando kaj Orlando Raola el Usono devis kontroli la kontlaboron de nia kasisto (William Harris). Ili konfirmis sian pretecon.

Voĉdono pri la Financa Komisiono: Unuanime konfirmita.

### **Tagordero 9. Elekto de la elekta komisiono (eblas, ĉar tria persono estis trovita intertempe)**

Estrarelektoj okazis en Kunming. Mireille estas en la fino de la mandato de Stefan MacGill, kiu demisiis post unu jaro. Estrarelektoj okazos venontjare (Ostendo). Ni devos pensi pri taŭga kaj efika Estraro.



(La hispanoj devos akcepti kunlaboron kun la 16-jare ekzistanta kataluna sekcio) MG informos Hispanion okaze de la anonco pri elektiĝo.

4. Bulgario. Unuanime akceptita.

La prezidanto atentigas, ke ni devas insisti pri la reguloj por novaj kaj malnovaj sekcioj ; aparte ke la sekcioj havu oficialan statuton en elektronika formo kaj ke ili sendu tion al ILEI. El 35 sekcioj, nur 10 sendis tian dokumenton al ILEI.

#### **Tagordero 12. Nova aperritmo por Juna Amiko**

ILEI havas du revuojn, *IPR* eldonatan 4-foje jare kaj *Juna Amiko* eldonatan 3-foje jare. Propono: Aldoni unu numeron jare de JA ekde 2015 por havi pli normalan eldonritmon. La revuo estas en tute nova situacio rilate redaktadon kaj presadon kaj ekspedon. Stano Marcek nun redaktas kun pluraj konstantaj kunlaborantoj. Iom kreskis abonoj, sed pro la pli altaj kostoj, necesos reklam-kampanjo. Unuanime akceptita.

#### **Tagordero 13 : Informoj pri la Tria tutmonda konferenco (kolokvo) (TTK) pri instruado de Esperanto**

Mirejo klarigas pri la estiĝo de la Kolokvo. La kantono subskribis leteron al la Ŝtatoj, kiuj havas ambasadejojn en Svislando, 180 entute. La kantono kaj la biblioteko de La Chaux-de-Fonds provizos senpagajn renkontiĝejoj. La kolokvo daŭros tri tagojn post la vespera malfermo je la 19.00h la 13-an de majo.

#### **Tagordero 14 : Diskuto kaj Aprobo de agadraportoj**

La tri raportoj estis unuanime akceptitaj.

#### **Tagordero 15 : raportoj de la sekcioj**

Ni ne havas ĉiujn raportojn de la sekcioj, do pri tiuj kaj pri aliaj aferoj, kiujn ni bezonas, ni devos labori kaj alvoki. Ni nepre devas havi detalajn raportojn kaj statistikojn por povi rilati kun eksteraj instancoj.

#### **Tagordero 16. Raportoj el la komisionoj**

Ne venis

#### **Tagordero 17. Raporto pri kunlaboro kun niaj partneroj**

Niaj partneroj estas movadaj establoj kiel E@I, IFEF k.s. Venas propono, ke ILEI ekrilatu kun ISAE, sciencistoj. MG aldonas: Ni ne miksu tiujn partnerojn kun ekstermovadaj establoj kiel ALTE, FIPLV k.s.

#### **Aliaj aferoj fine de la dua kunveno**

MG informas pri **arkivoj**.

Parto de arkivo de ILEI estas en Massa, IT, parto en Herzberg, DE, parto en CDELI La Chaux-de-Fonds, CH, (tie problemoj pri translokiĝo, poste inundoj), parto ĉe Stefan MacGill en Budapesto, HU. Ni devas kolekti elektronikan formon de la statuto de ĉiu sekcio. Gravaj dokumentoj iru al tri komputiloj.

Okazas diskutado pri la nuna stato de la **ekzamenoj**, tiuj de KER (UEA) kaj tiuj de ILEI-UEA. MG informas. Ekzistas klaraj diferencoj: ambaŭ estas bezonataj kaj plu vivas.

Stefan MacGill petas, ke ni pensu en granda perspektivo pri tri gravaj aferoj:

Kiel altiri pli junajn membrojn al la Esperanto-movado kaj aparte al ILEI?

Kiel pli praktike helpi al instruistoj?

Kiel igi la Komisionojn de ILEI fakte funkcii?

(okazis preskaŭ neniuj agado dum la lasta jaro)

XX

## **Protokolo, Komitato de ILEI, Montevideo 2014**

Tria kunveno. Merkrede la 23-an de Julio

09h12 malfermo

24 voĉoj. Kvorumo estas.

### **Tagordero 18. Ĉefaj agadoj por 2015 , strategio**

Unesko kaj TTK estu niaj ĉefaj celoj kaj agadoj

### **Tagordero 19. Financoj**

Ĝenerala prezento kaj analizo.

La kontribuo de UEA al ILEI ankoraŭ ne estas decidita.

La tabelo prezentas la rezultojn por 2012, 2013, 2014 ĝis la unua de Julio kaj la buĝeton por 2015.

Antaŭe la kontoj devis esti tie, kie loĝis la kasisto. Nun ne plu. Ni estas survoje al alveno de niaj monrezervoj en Nederlando laŭ decido de la Komitato en Herzberg.

Propono altigi la kotizon de JA je 2 EUR post decido salti al 4 numeroj jare.

Unuanime akceptita.

Propono enkonduki retan abonon je la nuna prezo :

Akceptita per 22 poraj voĉoj kaj 2 sindetenoj

JA libere alirebla sur la reto unu jaron post la apero de la papera versio.

Esplora afero : ILEI kotizo devus kovri la ĝeneralajn kostojn de IPR (por A-landoj kaj B-landoj). La estraro preparu dok por la Komitato en 2015.

Kontribuo de ILEI al UAM : en 2014 ILEI pagis 610. Restas 190 EUR. Venas denove 800 EUR por 2015 en la buĝeto.

El Fondaĵo Szerdahelyi :

Ni deprenis 300 EUR por 4taga laborkunveno pri terminaro. Estu 1000 EUR por TTK.

MG anoncas la transdonon de la havaĵo kaj de la laboro de la **Fondaĵo HANS** al ILEI. MG anoncas la alvenon de monsumo por **agadi en Nov-Zelando**. MG anoncas la **premion Maŭro La Torre**.

### **Fondaĵo Interkulturo kaj aliaj fondaĵoj**

Povus veni priskriboj de subteneblaj projektoj. MG esploros pri la regularoj kaj informos la komitatanojn per la Reto.

### **Universitata agado**

Bharat Ghimire iris al Pakistano por prelegi pri Eo en iu universitato. Li asertas : tio estas « universitata agado », mia tasko. Li demandas, ĉu ILEI povas subteni finance tiajn vojaĝojn. Li baldaŭ flugos al Delio. Celo : prelegi pri Eo cele al lanĉo de kurso. MG informiĝos pri ebla subteno. Ŝi sugestas, ke li laboru kun Maritza Gutiérrez el Kubo kaj tie kun Julian Hernández Angulo, kiu instruas en universitato.

### **Buĝeto**

Por Afriko 600 EUR

Por Azio 100 EUR, ĉar KAEM havas aliajn monfontojn.

Por Sud-Ameriko 800 EUR

Aperas deficino je 1300 EUR

### **Tria Tutmonda Kolokvo (TTK)**

MG donas informojn. Estos sponsoroj kaj mecenatoj. El kiu fondaĵo ni prenu monon ? Fina decido : 1000 EUR el Szerdahely. Kaze de gajno, ĝi iru al tiu fondaĵo.

**Voĉdono** pri financa raporto kaj malŝarĝo de la kasisto kaj de la estraro :

Aprobitaj unuanime.

**Voĉdono** pri buĝeto : 23 voĉoj por, 1 sindeteno.

### **Tagordero 20. Organizaj demandoj, funkciado de la Ligo**

MG precizigas :

Estas 3 kampoj : lingvokursoj – IT (Instruista Trejnado) – AT (Aktivula Trejnado). Tiu lasta estas en la manoj de UEA. En IPR 1 kaj 3 : kalendaro pri lingvokursoj. En IPR 2 kaj 4 : kalendaro pri IT.

### **Tagordero 21. Nomo de la Ligo en diversaj lingvoj**

Aperas diversaj nomoj en nia Interna Regularo, en wikipedia, sur [www.ilei-mondo.info](http://www.ilei-mondo.info)... MG klarigas, ke ŝi volis fari ordon, tamen ne trovas taŭgan solvon en la franca. La problemo estas pli tikla ol antaŭvidite. Ne urĝas. Ŝi rekomendas, ke la sekcioj trovu mallongan nomon « Esperanto kaj Edukado » por uzo sur nomŝildoj en internaciaj kunvenoj.

### **Tagordero 22 Eksteraj rilatoj. Kontakto kun ekstermovadaj establoj.**

MG informas pri nia partopreno ĉe ALTE, ĉe UNESKO, ĉe Unio de Internaciaj Asocioj k.s. Ŝi prezentas tabelon kun partoprenoj kaj elspezoj de estraranoj kaj reprezentantoj. Tio estu informo. Se ILEI volas agadi tiel, devus esti repago de kostoj. Ĝis nun tio apenaŭ okazas. Tia agado estas tre valora; tamen ILEI devas trovi taŭgajn personojn, kiuj havas tempon partopreni kaj kiuj havas kapablojn adekvate kontribui.

### **Tagordero 23. Informado, komunikado, retejoj**

La prezidanto donas grandan atenton al la enhavo kaj kvalito de IPR. Plie ŝi zorgas pri la enhavo de la retejo ilei.info. Negativa punkto estas la evoluo de ilei-mondo.info, kiu lamas. Solvo estas nun trovita, la laboro komenciĝos tuj post la Konferenco.

### **Tagordero 24. Eldonado**

Mankis tempo kaj mono por tio. Ni nenion eldonos dum 2014.

### **Tagordero 25. Konferencoj : nuna disvolviĝo, necesaj modifoj, novaj lokoj**

La prezidanto petis la estraron, ĉefe la sekretariojn, koncepti liston de kriterioj, laŭ kiuj ĝi elektu konferencan urbon. Per tia dokumento la estraro povos adekvate elekti. Tio bezonatas pro diversaj mankoj kaj paneoj en 2014.

Loko de Konferenco. UEA konsultis ILEI-n pri 2016 antaŭ ol fiksi UK-n. Premio ? 2017 : ĉu Afriko kune kun TEJO IJK ? Se homoj volas vidi du landojn, povus esti Benino kaj Togolando. La decido pri 2016 devas veni antaŭ la fino de 2014 ; tiel ni havos 18 monatojn por prepari ĝin.

### **Tagordero 26. Ceteraĵoj**

Ne estas. Vidu la sekvon.

XX

### **La komitato traktas la 3 sugestojn de Stefan MacGill**

1. Ĉu ni laborigu niajn komisionojn ?

MG anoncas la reviziadon faritan. Ĉiu komisiono konsistas el helpopretaj homoj. Laborigi ilin nur por laborigi ilin ? Ni laborigu ilin laŭ bezono.

Stefan anoncas bezonon reverki parton de la Interna Regularo 7.1.2. ( ?). Farenda en 2015.

2. Ĉu ni trovu manieron junigi nian membraron ?

El diskuto venas : kontakto kun skoltoj, TEJO, Junaj staĝuloj de internaciaj organizaĵoj, Taizé renkontiĝoj kaj similaj religiaj renkontiĝoj

3. Subteno al instruistoj

Tio okazas ĉefe tra IPR nun. MITE devas atingi uzeblon.

### **La komitato traktas 3 proponojn de la nederlanda sekcio.**

1. Sugesto milde ekzameni kaj taksu pri gramatikaĵoj ankoraŭ ne fiksitaj, deciditaj.

2. ILEI eldonu liston de legendaj verkoj. MG informas, ke tia peto jam venis de aliaj personoj. Rob Moerbeek pretas esplori kaj verki malneton.

3. En IPR aperu io pri la kulturo de la konferenca lando, kaze ke tiu lando ne estas UK-lando. Ĝenerala aprobo.

### **MG informas**

Plia rimarko : mankas biografio de niaj Honoraj Membroj sur nia retejo. Ni devas aldoni tion iom post iom.

Danko iras al diversaj tradukhelpantoj : Glossop, J.P. Ducloyer, Montesinos, Charters.

Buenos Aires

2014-08-06

Mireille Grosjean

Laŭ notoj de Duncan Charters (kunvenoj 1 kaj 2)

kaj de Rob Moerbeek (kunveno 3)